

[noto] fonto: "La Esperanta Budhano", n-ro 4, BLE, 2005

La juvelsutro

Ratanasutta

el Nipāta 2-1

(el la palia) trad. **Gunnar Gällmo**, Svedio

1. Kiuj ajn estaĵoj ĉi tie estas kune,
ĉu ligitaj al la tero ĉu al la aero:
estu ili ĉiuj ĝojaj
kaj aŭdu ili zorge la diroton.
2. Tial ĉiuj estaĵoj aŭskultu
kaj ĉion ampleksantan amon donu al homoj
tage kaj nokte donacojn portantaj.
Tial protektu ilin zorgeme.
3. Ĉiu riĉaĵo en ĉi mondo aŭ alia,
ĉiu valora juvelo en mondoj feliĉaj
por ni ne kompareblas kun la tiel evoluinta.
En la Budho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
4. La ĉeso, la senpasio, la senmorto valora
kiujn atingis la Sakjo-saĝulo koncentrita -
nenio kompareblas kun tiu Dharmo.
En la Dharmo estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
5. Kion la supera vekiĝinto laŭdis kiel puran
nomiĝas sinsekvaj koncentrostatoj.
Kun tiu koncentrado nenio kompareblas.
En la Dharmo estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
6. La ok, kiujn laŭdas la konsciaj, la kvar paroj,
disĉiploj de la bone evoluinta, meritas oferojn.
Donacoj al ili portas grandan frukton.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
7. Kiuj agas bone kun forta koro,
senpasiaj en la instruado de Gotamo,
kiuj atingis la atingeblan kaj liberigis sin de morto,
libere ĝuas ili la freŝecon atingitan.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
8. Kiel fortan foston, enpuŝitan enteren,
la kvar ventoj ne povas skui,

tiel mi diras tiun esti vera homo
kiu tute vidas la noblajn verojn.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

9. Kiuj komprenas la noblajn verojn,
bone klarigitajn de la profunde saĝa -
kiel ajn neglektemaj ili estas,
ili ne ekprenas okan iĝon.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
10. Kiu ne povas ne vidi, tiu forlasas tri aferojn:
kredo je mio, dubo kaj ritmo, se ajna.
Libera li estas de la kvar abismoj,
kaj ne kapabla fari la ses plej gravajn misagojn.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
11. Kiel ajn li agas malbone korpe, parole aŭ pense,
li ne povas tion kaŝi.
Laŭdire tio ne eblas por vidanto.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
12. Kiel en bosko, en floranta arbopinto
dum la unua somera monato,
tiel li klarigis la plej bonan Dharmon
kondukantan al nirvano, al la plej alta bono.
En la Budho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
13. La plej bona, plej scianta, plej donanta, plej portanta
kaj senkompara klarigis la plej bonan Dharmon.
En la Budho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
14. Elĉerpiĝis la malnova origino, ne estiĝas nova
el senpasia menso en estonta vivo.
Ĉi semoj elĉerpitaj, ne plu inciteblaj,
la saĝuloj estingiĝas kiel jena lampo.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
15. Kiuj ajn estaĵoj ĉi tie estas kune,
ĉu ligitaj al la tero ĉu al la aero:
la tiel evoluintan, de devaĵoj kaj homoj laŭdatan
Budhon ni honoru. Estu bonfarto.
16. Kiuj ajn estaĵoj ĉi tie estas kune,
ĉu ligitaj al la tero ĉu al la aero:
la tiel evoluintan, de devaĵoj kaj homoj laŭdatan
Dharmon ni honoru. Estu bonfarto.
17. Kiuj ajn estaĵoj ĉi tie estas kune,

ĉu ligitaj al la tero ĉu al la aero:
la tiel evoluintan, de devaĵoj kaj homoj laŭdatan
Sanghon ni honoru. Estu bonfarto.